




Tradukita de
Jesper JACOBSEN

La spaco



Teksto de Stéphanie Ledu
Desegnaĵoj de Didier Balicevic



Se vi rigardus la Teron de **raketo**,
vi vidus ke ĝi estas granda blua **globo**.


4



La **Tero** sin turnas ĉirkaŭ la **Suno**.
Ĝi ankaŭ turniĝas ĉirkaŭsi mem, kiel turbo.
Kiam la Tero alfrontas la Sunon, estas **tago**.
Kiam la Suno malantaŭas la Teron, estas **nokto**.

5

La Tero havas kunulon, kiu sin turnas ĉirkaŭ ĝi: la **Luno**.
Oni diras ke ĝi estas la « **satelito de la Tero** ».




La Luno brilas ĉar ĝi **spegulas** la lumon de la Suno.
Ĝi ankaŭ estas globo...





...sed kiam la **ombro** de la Tero falas sur ĝi,
oni vidas nur **lunarkon**.



8 planedoj sin turnas ĉirkaŭ la Suno:
ili estas parto de la sunsistemo.








Jupitero

Saturno

Neptuno

Urano

Jupitero, Saturno, Urano kaj Neptuno estas longe for.
Ili estas enormaj buloj da gaso.



La **Suno** estas giganta bulo el fajro kaj gaso kiu senĉese eksplodas. Tio estigas varmon kaj lumon.

La Suno estas stelo. Estas miliardoj da aliaj steloj sur la ĉielo, sed ili estas multe pli longe for.

Nokte vi eble vidis **meteorŝtonon**... Estas fakte eta ŝtono veninta de la spaco. Ĝi moviĝas rapidege!



Kelkfoje pli granda ŝtono falas sur la Tero : estas **meteorito**. Frakasigante ĝi formas **krateron**.



A large, gold-colored telescope is mounted on a complex mechanical base on a hill. A small figure of a person in a white lab coat stands next to the telescope for scale. The background shows a dark night sky with stars and a distant mountain range.

La astronomoj observas la
ĉielon per giganta lorno:
estas **teleskopo**.



Jen **Hubble**, alia teleskopo. Ĝi estis lanĉita en la
spacon por foti stelojn kaj planedojn, kiuj foras je
miliardoj da kilometroj.

La unua vivantulo sendita
en la spacon estis hundineto,
Lajka.




Kelkajn jarojn poste,
3 homoj ekflugis en
la *raketo Apollo*.
5, 4, 3, 2, 1, nul'...
Celo: la Luno!



Misio sukcesa! La **astronaŭtoj** starigas la flagon de sia lando sur la **Luno**. Ili kolektas ŝtonetojn por reporti ilin al la Tero.



A detailed illustration of the International Space Station (ISS) in space. The station is a complex structure with multiple modules, solar panel arrays, and antennas. It is shown in a perspective view, with the Earth's horizon visible at the bottom. The background is a deep blue space filled with stars and a crescent moon in the upper left corner. A space shuttle is depicted in the lower right, approaching the station. The overall scene is a vibrant and detailed representation of the ISS in orbit.

Nuntempe, oni kunmetas la pecojn de la **internacia Spac-stacio** en la spaco.

Ĝiaj pecoj estas alportitaj de **navedŝipoj** kaj raketoj. Estas kiel vastega konstru-ludo!

Astronaŭtoj vivas kaj laboras ĉi tie.
Interne de la stacio, ili **flosas**:
en la spaco, oni neniom pezas.



Por eliri, ili surmetas **spac-kafandron**
kun aerboteloj por spiri. Ili estas ligataj
al la stacio per solidega kablo.

Marso estas la planedo, kiu plej similas al la Tero.
Homoj ŝatus jam viziti ĝin por eble tie poste vivi.

Kaj vi, ĉu vi ŝatus tien iri?



La Spaco

Se vi enirus raketon por vojaĝi en la spaco, vi vidus ke la Tero estas granda blua bulo. Ĝi turnas sin ĉirkaŭ la Suno, samkiel la 7 aliaj planedoj kiu konsistigas nian sunsistemon. Kaj ĝi havas tre belan najbaron: la Lunon.

Ekde 3 jaroj

